

*n m u*

# **The British Esperantist**

n<sup>o</sup> 658 · june 1960

*one shilling*

*v m*



Scots Esperantists at "Youth House," Strathkiness, during their  
14th annual study circle, 15th-18th April, 1960 (page 267)

# The British Esperantist

*Publishers:*

THE BRITISH ESPERANTO  
ASSOCIATION, INC.  
140, Holland Park Ave.  
London, W.11

*Editor:*

D. B. GREGOR, M.A., L.B.E.A.  
27, Rushmere Road  
Northampton

Contributions should be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements: £3 per page and pro rata to one-eighth.

## CONTENTS

	page
Unu jaro da Redaktoreco ..	261
Fruaj Memoroj de Esperantisto 11331. <i>H. A. Epton</i> ..	262
Poezia Angulo. <i>C. Mallia</i> ..	263
Translation Competition ..	263
Fajrujoj de Esperantujo <i>M. Boulton</i> ..	264
Esperanto in the British Press ..	265
From Near and Far: Home ..	266
From Near and Far: Abroad ..	267
La Junularo .. .. .	268
Novaj Libroj .. .. .	269
Esperanto en Radio .. .. .	275
Mortoj .. .. .	275
Official Notices .. .. .	276

## LEARN BY EXAMINATION

★ ★ ★

The examinations of the B.E.A. test your knowledge  
and stimulate further study

★ ★ ★

Send stamp for details - - Specimen papers available

★ ★ ★

Elementary 3d.      Advanced 6d.

# The British Esperantist

(incorporating "International Language")

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

56TH YEAR, No. 658

JUNE, 1960

## UNU JARO DA REDAKTORECO

Post dekdu monatoj mi volus danki ĉiujn, kiuj per sia praktika kaj morala subteno plifaciligis la plenumadon de mia tasko. Kia mi opinias tiun, mi klarigis en mia inaŭgura artikolo; kaj dum unu jaro mi faris mian eblon, por ke nia gazeto samtempe distru la legantaron, antaŭenigu la Movadon, kaj alte tenu la prestiĝon de la lingvo.

Kelkaj novaj rubrikoj aperis, kelkaj bone konataj malaperis. La "Paĝo por Geknaboj" forvelkis pro manko de materialo; kaj efektive ne estas facile, trovi infanojn kapablajn senhelpe verki rakontetojn por siaj samaĝuloj. Tiaj verketoj tamen estos ĉiam bonvenaj, ĉar ni volas montri, kaj eĉ pri tio fieri, ke inter ni troviĝas kompetentaj infanoj; kaj se ekzistas gepatroj de denaskaj Esperantistetoj, ili farus bonan servon, tenante nin informitaj pri la lingva evoluado de tiuj etuloj, sur kies lipoj Esperanto jam ne estas nur genia elpensajo, sed la natura esprimilo de spontane eldirataj sentoj.

Elfalis ankaŭ la "Paĝo por Studantoj"; sed estas espereble, ke ĉiu paĝo liveras al la atenta leganto ion lingvan por studi, kaj la klare eksponitaj lecionoj de S-ro Gething nun troviĝas tre bone kaj alireble disponigitaj en lia antaŭnelonge aperinta libro. Dume, en la "Lingva Angulo" legantoj havas forumon por tiu lingva diskutado kiu ne devas manki en Esperanta gazeto.

Rilate la formon en kiu la kontribuajtoj atingas min, kelkaj vortoj estas necesaj. Mi havas la impreson, ke inter la Esperantistaro troviĝas iuj el la plej veteranaj skribmaŝinoj en la lando. Nenio hontinda pri tio—ankaŭ la mia havas 25 jarojn. Tiun respektindan aĝon tamen mi penas kaŝi per ofta ŝanĝado de la rubando kaj eble malpli ofta purigado de la literoj. Kiam oni preparas ion por la presado, necesas ĉiam pensi pri la kompostisto: unujara redaktado instruis al mi almenaŭ tion.

Ofte mi pensas, kiom estus pli agrable redakti la gazeton se mi estus pensiulo, disponanta pri liberaj tagaj horoj. Sed por emeritigi, oni devas plimaljuniĝi, kaj tio estas malpli agrabla. Samtempe tamen kuraĝigas min la granda, senĉesa laboro de la brita Esperantistaro, kia tiu evidentigas en la rubrikoj "Home News" kaj "The British Press". La nomo de Esperanto kaj ĝia fakta ekzistado estas ja daŭre portata antaŭ la publikon. Tiel la gutoj konstante frapas; kaj iam la gigantano, nigrano, nube kovritan rokon de apatio kaj nescio ili traboros!

*La Redaktoro.*

## FRUAJ MEMOROJ DE ESPERANTISTO 11331

En la Septembra numero de *British Esperantist* mi priskribis kiel mi fariĝis Esperantisto en la jaro 1903a, kiam mi estis nur dekkvar-jara lerneĵano.

Unu jaron poste, mi forlasis la lernejon kaj eniris komercan vivon. Apenaŭ necesas diri, ke mi jam estis fervora Esperantisto kaj membro de la Londona Esperanto-Klubo, kiu tiutempe kunvenis en la St. Bride's Institute, apud Ludgate Circus. Tiu membriĝo ebligis al mi por la unua fojo interparoladi kun aliaj samideanoj; kia mirinda sperto tio estis!

Unu vesperon en Aŭgusto, 1905, mi spertis tute neatenditan travibron, kiam mi renkontis en la Klubo samideanojn ĵus revenintajn el Bulonjo, kie ili estis partoprenintaj en la *UNUA* Universala Kongreso de Esperanto. Neniam antaŭe Esperantistoj kunvenis grandnombre el ĉiuj partoj de la mondo. Jen superega provo; ĉu ili povos interkompreni ĉiu la alian, sen helpo de interpretistoj? Iliaj duboj forflugis kaj plej grandaj esperoj ja realiĝis! Kia ajn la naciĉo de la parolanto, kaj kia ajn tiu de la aŭskultanto, ĉiu lia vorto estis tuj komprenata! Kaj, parolante persone, post nur du jaroj, mi mem povis sperti tiun fenomenon, kiam mi ĉeestis la *TRIAN* Kongreson en Cambridge.

Mi komencis korespondi kun eksterlandanoj, interŝanĝante kun ili ilustritajn poŝtkartojn. Dum la sekvantaj jaroj mi kolektis centojn da kártoj; kaj eĉ nun, post pli ol kvindek jaroj, mi ankoraŭ posedas la unuan Esperantan karton, kiun mi iam ricevis!

En la sama jaro, mi havigis al mi novan oficon kun firmao de Marasekuristoj en Lloyds, kiel stenografiisto. Mi tre ŝatis tiun laboron, kaj post mallonga tempo, mi decidis ke kariero

asekura certigos al mi la plej bonan esperon por mia estonto. La romaneca, kiel ankaŭ la materiala, aspekto de kio ajn rilatanta la maron kaj ŝipojn, interesis min; kaj tiucele mi komencis studi serioze la temon en la vespera lernejo, kie mi estis antaŭe akirinta diversan sciaron komercan. Sed la Destino, maskita en la vesto de la 'sireno' Esperanto, intermetis sin kaj ekprenis la direktan radon de mia ŝipo de vivo, turnante ĝin al tute malsama direkto—kiel mi klarigos poste.

En la aŭtuno de la jaro 1906, kiam la vespera lernejo remalfermiĝis, mi aliĝis al nova kurso por la instruado de Esperanto, kvankam kompreneble pri ĝi mi jam havis sufiĉe bonan scion. Mi tamen aliĝis parte por pligrandigi la nombron da studentoj, kaj parte por praktiki la lingvon kun aliaj junuloj simile interesitaj. Kaj estis tie, kie mi renkontis Philip Kay, junulon iom pli aĝan ol mi; kaj ni baldaŭ amikiĝis, tiom ke, laŭ miaj okuloj, li estas 'David' kaj mi 'Jonatano'.

Kiel mi priskribu lin? Li estis proksimume ses futojn alta, bone konstruita korpe, kun forta vizaĝo kaj firma mentono. Li tamen havis unu ekscentrecon: kvankam preskaŭ ĉiam nete vestita, li ŝajne neniam purigis al si la botojn! (Nia amikeco estis destinita daŭri multajn jarojn, eĉ dum mia vivado en Nova Zelando kaj post mia reveno al Britujo en 1912, kiam mi eksciis, ke Philip Kay estas la U.E.A.—Ĉef-Delegito en Londono. Mi devas aldoni, ke per lia helpo kaj influo oni elektis min kiel profesian Londonan Sekretarion de U.E.A.) Ni kutimis vagadi kune en la kamparon kaj viziti la Londonan Esperanto-Klubon (li ankaŭ estismembro). Ni ankaŭ partoprenis en ekskursoj Esperantistaj al diversaj lokoj.

Unu vesperon, frue en la jaro 1907, ĉe la Esperanta kurso, la instruisto (kiu estis la tiam bone-konata pioniro G. L. Browne) informis min ke li ekscias pri ofico, kiu eble interesos min: tio estas, kiel Esperanta korespondisto kaj tradukisto ĉe firmao de reklamagentoj—'C.A.G. Browne Advertising Agency'.

Mi vizitis la estron de la firmao kaj akceptis lian proponon de salajro de £1 10s. ĉiusemajne—ne malbone por deksep-jara junulo! Mi decatempe informis miajn ĝisnunajn estrojn pri mia nova ofico, ne sen iom da bedaŭro, ĉar mi estis ja tre feliĉa tie.

Kvankam mi antaŭe planis marasekuran karieron, tiu 'sirena' propono defleksis min for de tiu direkto al mia unua (mi emfazas tiun vorton) okupo kiel profesia Esperantisto, kredeble la unua tia ofico komerca en la mondo—plej certe la unua en Britujo.

*Harry A. Epton.*

*(daŭrigota)*

## Poezia Angulo

### HEJMO

Agonias la tago,  
Foriĝas la lum':  
La nokt' adiaŭas  
En sia konsum'.

Subite aŭdiĝas  
La hajlosonor'  
El multaj tintiloj:  
Belega la hor'!

Kaj iras mi hejmen,  
Simile al ŝip'  
Venanta havenon,  
Kun libro kaj pip'.

Ho hejmo tre kara!  
La paco en vi!  
Vi estas la ĝojo  
De l'vivo por mi!

*Carmel Mallia.*

## Translation Competition 25

The Liberal religionists of this day are a very mixed body, and therefore I am not intending to speak against them. There may be, and doubtless is, in the hearts of some or many of them a real antipathy or anger against revealed truth, which it is distressing to think of. Again; in many men of science or literature there may be an animosity arising from almost a personal feeling; it being a matter of party, a point of honour, the excitement of a game, or a consequence of soreness or annoyance occasioned by the acrimony or narrowness of apologists for religion, to prove that Christianity or that Scripture is untrustworthy. Many scientific and literary men, on the other hand, go on, I am confident, in a straightforward impartial way, in their own province and on their own line of thought, without any disturbance from religious opinion in themselves, or any wish at all to give pain to others by the result of their investigations. It would ill become me, as if I were afraid of truth of any kind, to blame those who pursue secular facts, by means of the reason which God has given them, to their logical conclusions: or to be angry with science because religion is bound to take cognisance of its teaching.

From *Apologia Pro Vita Sua*  
(John Henry Newman).

Readers are invited to translate the above text into Esperanto. Translations should be sent in an envelope marked *Traduko* and arrive at the B.E.A. Office before 21st July next. Books to the value of 10s. 6d. will be awarded to the sender of the best translation, if sufficient are received. The result will be announced in our September issue.

---

Donations to B.E.A. Library: Anon £1; L. Hartridge, 10s.

# FAJRUJOJ DE ESPERANTUJO

## VI. Szeged, Hungarujo

Nia sento pri sankteco estas ĉiam afero iom subjektiva. Szeged mi persone neniam forgesos. Mi memoras kiel, unu belan printempan matenon, mi apogis min sur la kubutojn, ĉe hotelĉambra fenestro, kaj vidis sub mi la delikatajn rozkolorojn kaj verdojn de kelkaj florantaj frukt-arboj. Kaj iel, mi memoras Szeged kiel floron en la koro. Ĉu eble kiel miozoton, la internacian floron de "ne-forgesu-min" ?

Tie loĝas kelkaj meritplenaj esperantistoj; tie troviĝas Esperantostrato, mallonga sed aŭtentika, kun portreto de Zamenhof sur la muro. La fervojistoj—kiuj brave pioniras pri nia lingvo en Hungarujo—havas sian propran esperantistejon. Sed por mi Szeged estas pilgriminda urbo, ĉefe ĉar Julio Baghy, nia poeto de homamo, nia romanisto de karitate komprenita homvero, nia ege aminda instruisto kaj ekzemplanto, naskiĝis tie.

Estas iom tipe, kaj de lia granda modesteco, kaj de lia preskaŭ legenda gloro inter aliaj, ke Baghy mem ne certas, kie precize li naskiĝis. Kie tiu die dotita, home suferonta infano por la unua fojo esploris en la malvarma aero de kruela mondo? Oni devas elekti inter du domoj. La veterana verkisto kredas ke la pli probabla estas la domo, kiu situas pli proksime al la urba teatro, kie iam lia patro laboris kiel aktoro. Mi faris fotojn pri tiu domo, kvankam pluvis kaj la lumo estis malbonega; ĉar eble mi neniam plu vidos la unuan neston de tiu unika, adorinda homo.

Printempaj floroj. Impona nova ponto. Digna teatro. Larĝa rivero, sur kiu sendube iam forfloris kelkaj revoj de maldika, grandokula knab-

eto. Universitata klostro. Interesa horloĝo el kiu venas, ĉiuhore, procesio de universitatuloj en pitoreskaj kostumoj. Katedralo. Kelkaj agrablaj verdejoj, kelkaj historiaj ruinaĵoj. Kultururbo, kun pasinteco kaj kun estonteco. Sed urbo, kies ekzistorajto estus pagita, se ĝi kreus nenion alian, sed nur estus naskinta tiun geniulon de amo kaj arto. . . .

Kaj kun Julio Baghy mi promenis sur la belaj stratoj de Szeged. Bubeto sur la placo kaptis grandegan kornhavantan ortopteranon; kaj mi ĉiam memoros la esprimon de simpatia intereso, kun kiu Julio Baghy rigardis eĉ tiun, laŭkonvencie, malbelan, fortimigan insekton. Mi ĉiam memoros la amikan, konfideman premon de tiu osteca brako sur la mian; la pro malsano altan kaj fluktuan voĉon, kiu aŭdigis tiom da amikaj, inspiraj, helpemaj, kuraĝigaj vortoj, da spritaĵoj, da interesaj klarigoj, da intimaj konfesetoj pri la infanaj jaroj.

Kiam ni diras, ke homo restas infanca, ni eble kritikis severe, eble diras la plej grandan laŭdon: infanca homo povas esti senrespondeca, naive egoisma, bagatele etmensa, psike nematura, per la vivado nenion lerninta; sed li povas esti homo, kiu, maturiĝinte, tamen neniam perdas ian esencan senkulpecon, ian simplan, belan kapablon ĝui ĝindaĵojn, ian fidelan amemon kaj mireman humilecon. Infancaj homoj de la unua tipo troviĝas en preskaŭ ĉiu strato; sed infancaj homoj de la dua tipo estas tre maloftaj kaj karaj personoj. Julio Baghy apartenas al la dua speco.

En Szeged, la lokaj esperantistoj gastigis min per—inter aliaj bonaj

pladoj — fiŝsupo forte spicita per papriko; oni ne riproĉu min do se la koro tre varmigiĝis en tiu urbo. Dum kelkaj minutoj, mi timis, ke eble mi eksplodos! Eble tiuj sovaĝaj fiŝoj iom plifortigis mian impreseblecon . . .

En tiu historioplana urbo, en lando kun tre tragika historio, Julio Baghy kaj mi promenis inter la floroj: tiu homo, kies tuta intelekta laboro celis la diversspecan liberigon, plibonigon aŭ konsolon de homoj; kaj mi, kies tuta intelekta laboro havas similan celon, sed kiu havas nek la koron nek la arton por simile sukcesi. Ni promenis, en tiu urbo, por ĉiam al mi sankta, ĉar tie naskiĝis la plej aminda esperantista verkisto. . . .

“Nia urbo Szeged havas multajn interesajn historiajn ruinaĵojn—min, ekzemple!” Li ridis pri sia propra kadukeco. La grizaj haroj hirtiĝis en la vento. Ankoraŭ ridante, la heroa veterano de nia kulturbatalo lude premegis mian manon. Kaj dum momento mi fantaziis, ke ŝtelmetis maneton en la mian bela, larĝokula, malgrasa, amema knabeto. . . .

Eterna, mirakla infano, malriĉa princeto, en la florplenaj printempaj stratoj de Szeged. . . .

*Marjorie Boulton.*



*Julio Baghy ekzamenas koleopteron.*

## Esperanto in the British Press

(13th April–14th May)

*Wolverhampton Express and Star:* Mr. C. J. Love tells Rotarians that although 60 per cent. of present-day scientific work is written in English, only 10 per cent. of modern scientists understand that language. German was understood by 20 per cent. and Russian and French by 30 per cent. Esperanto has its glossy magazines—from Communist countries, which subsidise them. *South Wales Evening Post:* International Brains Trust at Swansea branch of I.F.L. discusses whether Esperanto can help to world peace. *Halifax Weekly Courier:* Mr. J. E. Sykes plays tape-recordings made in five European capitals. *Aberdeen Evening Express:* Esperanto headline above account of conference at Strathkinness (see p. 267). *Fifeshire Advertiser:* Strathkinness again in long, detailed article. *Bexhill Observer:* A meeting of the Fellowship of Reconciliation feels that language is not the only barrier between peoples. *Sunderland Echo:* Miss M. A. Armitage, keen member of South Shields Esperanto Club, goes to Falkland Islands as teacher. *Bristol Mirror:* Miss M. J. Thorne addressed Women's Guild on Esperanto. *Kensington News:* Death of brother of the late Mrs. Goodall, authoress of “Tales told to a Squirrel,” recently put into Esperanto Braille. *Keighley News:* Reveals preparation of Temple St. Methodist Girls' Choir for concert of songs in Esperanto at Harrogate Congress. *Reveille:* A member of B.E.A. on the staff of this paper selected as the two-guinea question “Why is Esperanto not taught in our schools?”, and gave an accurate reply based on information gleaned from the B.E.A. office and London education authority. *Hark* (magazine of the Hard of Hearing): Two column article on Esperanto by Mr. T. E. Cottam. *Manchester Evening News, Bradford Telegraph and Argus, Sheffield Star, Halifax Daily Courier, Burnley Express and News, Oldham Evening Chronicle, Newcastle Journal:* Miss Kajino's visit. *Newcastle Evening Chronicle:* Brief account of Esperanto. *Newcastle Journal:* A.G.M. of local society. *Halifax Daily Courier:* Meeting of local Society. *Aberdeen Press and Journal and Evening Express:* Dr. Barasi's talks on Esperanto among physicians. *Southend Standard:* A.G.M. of Eastern Federation addressed by Mr. J. W. Leslie. *Daily Worker:* Esperanto Congress in Miskolc, Hungary. *East Midlands Electricity Journal:* Article by Mr. B. Coggins on visit to Esperantist friends in Finland.

## FROM FAR AND NEAR

### At Home

**Hexham:** The Hexham Esperanto Group commemorated the Zamenhof Centenary not only with a meeting, which had a good report in the local press, but by offering a Zamenhof Centenary Memorial Scholarship to send a promising beginner to the Universal Congress in Brussels. As a result, two new Esperanto classes were inaugurated. Three prize-winners have just been named; all three are students of the Northern Counties Training College. From left



*Three lucky prize-winners*

to right: Ann Phillipson won the third prize, a copy of *Burĝonoj*, appropriately inscribed; Mary Dobbin won the second prize and special arrangements have been made for her to go to the *Kulturdomo* in Grésillon; the lucky winner of the Brussels Scholarship, Sheila Rankin, seen here giving a famous or notorious cat a victory hug, after a brilliant paper and oral test, is looking forward to going to Brussels with all expenses paid.

This scholarship, which created considerable local interest, was made possible entirely by the personal sacrifices of members of the Hexham Group.

**Stoke-on-Trent** this year celebrates the jubilee of its birth from a federation of the Five Towns of the Potteries, made famous by Arnold Bennett in literature and in commerce known throughout the world for its ceramics. The Five Towns were in fact six, all of which retain their old names and memories; but the city is now the twelfth in England, not only active and prosperous, but rich in educational and cultural facilities, especially music. Once notorious for its smoke and grime, Stoke-on-Trent is rapidly becoming a clean city with many fine modern buildings.

Further evidence of the progressive atmosphere of Stoke-on-Trent may be found in the recent successes of Esperanto: the Group recently founded is growing and maturing under the guidance of Alderman Horace Barks and Mrs Evelyn Maud Boulton; more young people are now coming into it. The luxurious jubilee guidebook (232 pages, with abundant illustrations) has the introduction by the Lord Mayor in English, French, German, Russian—and *Esperanto*.

**Eastern Federation:** One of the most successful conferences of recent years was held at the Palace Hotel, Southend-on-Sea (whose interest in Esperanto was evidenced by the free use of a truly luxurious hall), on Saturday, 30th April, attended by about fifty from Billericay, Clacton, Ilford, Ipswich, Romford, Southend and Walthamstow.

The business of the A.G.M. was disposed of expeditiously, and officers elected included the President (Mr. E. R. Holt of Billericay) and the Hon. Secretary (Mrs. M. Green, 78, Reading Road, Ipswich) and then the conference was privileged to listen to Mr. John Leslie, Secretary of the B.E.A., who was accompanied by his



wife. Taking as his theme "Kion mi celas?", he delivered a masterly address and held his large audience so intently that they almost forgot to go to tea! After a delightful meal, a clever and amusing Cabaret Show was put on by two young members from Ipswich, Miss Patricia Meekins and Miss June Stringer, assisted by their teacher, Mrs. Myrtle Green and Mrs. F. E. Shortland.

At the close, thanks were expressed to the local Esperantists who had made such excellent arrangements under the direction of Mr. R. Murray, O.B.E., and it was announced that the next conference would be at Clacton-on-Sea on Saturday, 3rd September.

**Bournemouth:** Divine Service in Esperanto will be held at Friends' Meeting House, Avenue Road, on the first Sunday of each month at 3.30 p.m. On 3rd July Mr. A. Krolenbaum, B.A., will conduct.

**Yorkshire:** F-ino Kajino has visited five Groups. Thirty-five members have spent a week-end in Ilkley. The guest-speaker, Mr. W. Auld, aroused great enthusiasm with his two lectures, "The Arts," and "What is Esperanto?"

**Wolverhampton:** At the invitation of Mr. S. Cullis, manager of Wolverhampton Wanderers Football Club, Mr. C. G. Love spoke to Rotary on 26th April. Eighteen booklets were sold. In his vote of thanks Mr. Cullis mentioned how he had met Esperantists abroad during his travels as a member of the England Football Team, and he thanked the speaker in Esperanto.

**Birmingham:** Miss V. C. Nixon has spoken to the Modern Language Club at Hereford on "Experiences abroad through Esperanto", and to the Coleshill Rotary Club on "Esperanto and how it works". On 6th

May Mr. W. A. Gething stimulated the Club with a talk on life as seen by a man just retired from the turmoil of London.

**London:** Divine Service in Esperanto will be held in the French Protestant Church, Soho Square, W.1, on 17th July at 3.15 p.m. F-ino E. Heath will conduct. All welcome.

**Scotland:** Scottish Esperantists held another successful week-end study circle at Strathkinness, Fife, this Easter, their fourteenth in a series of such annual events at that congenial hostel, where veterans renew old acquaintance and newcomers are inspired with enthusiasm for "the cause".

Discussion of such serious matters as the past and present state of Tibet was relieved by recitations and choral singing, and the members dispersed regretfully, but looking forward already to "the Fifteenth" next year.

**International Friendship League:** John Leslie addressed the Hampstead Branch on 16th May, having been invited as a result of his talk to the Central London Branch already reported. The Programme Secretary later wrote: "I think Esperanto should almost be a "must" for all real I.F.L.-ers, and it is very good that the B.E.A. and the I.F.L. are now co-operating. I really intend to start learning it myself now."

### Abroad

**Hindujo:** "Mi kore dankas vin pro la du pakajoj, kiuj ĵus alvenis, unu adresita al Aĉarja Vinoba Bhave kaj la dua al mi persone, enhavantaj po 12 ekzemplerojn de la broŝuro pri D-ro Zamenhof. Mi ĵam transsendis la unuan pakajon al Vinobaĵi kun taŭga letero kaj mi estas certa, ke ĝi atingos lin bonorde kaj li trovos la enhavon interesa.

Ni, la hindaj Esperantistoj, jam ricevis multe da valora helpo de britaj samideanoj, kaj pro tio ni estas ege dankoplenaj al ili. Ni esperas, ke tia amika kunlaborado gvidos nin al la celo—la triumfo de Esperanto en la Oriento kaj eventuale en la Mondo.” (El letero al S-ro J. W. Leslie de D-ro Rama Hejde, 7/A Balgovindas Road, Mahim, Bombay 16, datita la 22an de Aprilo.)

**Usono:** Aperis la unua usona skolta Revuo (kun insigno desegnita de S-ro C. D. A. Capp). S-ro D. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, akceptis la postnonon de Trupestro de la Monda Trupo.

**La 45a U.K.:** Ĝis fino de Aprilo la “Operacio Adoptaj Gepatroj” kolektis 18,300 b.fr. Tri aliaj infanoj el Finnlando estas invititaj veturi gaste al Bruselo por partopreni en la 5a Infana Kongreseto. Notu, ke aliĝoj por la U.K. ne estos akceptitaj post la 30a de Junio. Ĝis 30a de Aprilo aliĝis 1465 el 41 landoj. La akcepto de la Kongresanoj je alveno en Bruselo estos zorgata nur en la Centra Stacidomo.

**Milan:** La 31a itala Kongreso okazos ĉi jare de la 10a ĝis la 16a de Septembro en Cortina d’Ampezzo inter la Dolomitoj. Pro tio, ke samtempe estos solenigata la 50a datreveno de la starigo de la Movado en Italujo, oni esperas, ke multaj alilandanoj partoprenos la manifestacion. Por tiuj aliĝo estas senpaga.

**Hong Kong:** S-ro Chester Chow Tien-Chi kolektis grupeton da amikoj, kiuj kunvenas unu fojon semajne en la ejo de U.N.A. en Hong Kong por studi Esperanton. Li volus antaŭscii pri eventualaj vizitontoj al la urbo, pri ke la grupo povu bonvenigi ilin. Ĉiuj presajoj utilaj al komencantoj estus bonvenaj. Adreso: G.P.O., Box 2135, Hong Kong.

## La Junularo

Posttagmeze la 9an de aprilo, aro da Esperantistoj ekŝieĝis la junulargastejon ĉe Lichfield, kaj je la kvina horo komencis okupi ĝin. La kialo de la atako? La semajnfina renkontiĝo de J.E.B., sub la generaleco de John Wells.

Dudek tri personoj ĉeestis, venintaj el Bristol, London kaj pli apudaj urboj. Inter la grupo, menciindaj estas pluraj lernantinoj el Great Barr (ĉekies lernejo oni instruas Esperanton); nia afabla prezidanto, Guy Tordoff, kiu tiel ĝentile venis de Bristol por esti inter ni—kaj John Wells mem, la verva organizinto de la tuta afero.

Sabate, post vizito al la bela urbo kaj ĝia katedralo, ni vojaĝis al Tamworth por aŭskulti prelegon de nia brava japana samideanino Joŝiko Kajino, kiu multe impresis ĉiun. Dimanĉon, ni ekskursis en la ‘Peaks’-distrikton de Derbyshire (per karavano de du skoteroj, aŭtomobilo kaj aŭtobuseto!). Ĉe Dovedale ni tagmanĝis kaj vagis (kantante aŭ ankoraŭ manĝante) trans la belaj tieaj montetoj. Fine, ni tie adiaŭis unu la alian kaj prenis niajn diversajn vojojn hejmen—post vere sukcesplena renkontiĝo. Ankoraŭ restas tempo aliĝi al la 16a Kongreso de T.E.J.O., okazonta ĉe Rotterdam, Nederlando, de la 23a ĝis la 30a de julio. Skribu tuj por detaloj al: H. R. Tonkin, St. John’s College, Cambridge.

H. R. T.



Generalo Wells instrukas sian soldataron

# NOVAJ LIBROJ

*Order starred books from the B.E.A.,  
others from the address given*

\***Lingvo kaj Vivo** de Gaston Waringhien. Esperantologiaj Eseoj. Alia en la Stafeto serio. Eldonisto: J. Régulo Pérez, La Laguno, Tenerifo, Kanariaj Insuloj. 1959. 452 paĝoj. Prezo: broŝurita 25ŝ., afr. lŝ. 3p.

La Eldonejo sciigas, ke per ĉi tiu volumo "Stafeto" komencas novan serion de siaj eldonoj. Apud la serio "Beletro" kaj "Scienco" nun troviĝas "Movado", per kiu la Esperantistoj ricevos fidindajn studaĵojn pri la faktoj, fluoj, institutoj, homoj . . . nome pri nia tuta interna kaj ekstera historio. Laŭdinda kaj amase subteninda entrepreno! Certe la unua volumo en la nova serio estas gravega kaj altvalora verkaĵo—kiel oni ja atendus de la plumo de Profesoro Waringhien—kaj ĝi inde atingas la nivelon postulitan de ĝia dediĉo, "Memore kaj Honore al Lazaro L. Zamenhof, Apostolo de la Paco, MCCMLIX—MCMXVII", kvankam en kelkaj lokoj ĝi ne estas paciga!

En la Preludo la aŭtoro montras, kiel filologoj perfidas sian profesion, ĉar kvankam ili energie dediĉas sin al la studo, priskribo kaj klasifikado de ekzistantaj lingvoj, eĉ la plej malgravaj, ili perverse ignoras Esperanton, kiu provizus ilin per la nunura ekzemplo de la naskiĝo de tute nova lingvo, uzata de plej diversaj rasoj kaj nacioj tra la tuta mondo. Tiu ignoro estas des pli perversa pro la fakto, ke Esperanto, uzata de tiaj diversaj homtipoj, eble ĵetus por ili utilajn lumojn sur la oft-diskutatan problemon, ĉu ekzistas ia baza logiko, komuna al ĉiuj homoj; ankaŭ sur la problemojn pri la socia naturo de Lingvo, pri ĝia psikologia bazo, pri la vojoj laŭ kiuj ĝi disvastiĝas, ktp. Waringhien mem majstre pritraktas tiajn problemojn.

**Parto I.** Sur p. 19–54 la temo estas "**Pra-Esperantoj**". Aperas ĉiuj troveblaj specimenoj de pra-Esperanto. Ili estas en si mem trege interesaj, sed ankaŭ, "sisteme studi tiujn pratipojn de Esperanto povus do havigi al ni klarigojn pri tiu aŭ alia enigma trajto de la nuna lingvo, kaj krome informi nin pri la maniero, kiel Zamenhof iom post iom akiris pli da sperto kaj eliminis la malĝustajn solvojn".

p. 55–72, "**Etimologiaj Esploroj**". La aŭtoro klarigas la devenon kaj historion (iufoje apogante sin sur probablajoj) de multaj Esperantaj vortoj, kaj montras la efikon de la principo de oportunigo. Oni rimarkas la neologismon *etimo* (55/16 kaj aliloke) = vort-fonto.

p. 73–101, "**La Fundamento de Esperanto**". (1) "Historia Aspekto", indikas la diversajn principojn, kiujn Zamenhof uzis por elekti la finan formon de la Fundamentaj Vortoj. La aŭtoro ekzempligas la funkciadon de tiuj principoj, citante multajn vortojn kaj iliajn font-lingvojn. Rilate la lastan ekzemplon sur p. 83, mi opinias, ke *ŝtuparo* = escalier, Treppe, Staircase, kaj *ŝtupetaro* = échelle, Leiter, ladder—kaj ne nur el ŝnuroj, kiel oni sugestas ĉe 88/24. Surprizis min legi je la malsupro de p. 87, ke *triviala* estis eĉ preskaŭ tute senutiligita de la enveno de *vulgara* kaj de *banala*. Certe en Britujo oni zorge atentigas lernantojn pri "danĝeraj vortoj", t.e. vortoj, kiuj estas similaj al Anglaj vortoj sed havas malsaman sencon, kaj inter ili estas *triviala* (= "strat-anguleca", kanajleca, vulgaraĉa) kaj *vulgara* (= rilata al hom-grupoj, komun-umeca, do ĝenerale kaj ordinare uzata). (2) "Vortkonstrua Signifo". La aŭtoro pritraktas la demandon, ĉu radikoj havas gramatikan karakteron, aŭ ne. Li klarigas la motivaĵon por tiaj diferencoj, kiel *broso*

kaj *kombilo*; li diskutas radikojn, kiuj en si havas nenian tuj evidentan gramatikan karakteron.

p. 102–129, “**La Originala Strukturo de Esperanto**”. (1) “La Vorto”. Ĉi tiu ĉapitro komenciĝas per komparo de tradukoj de aferletero en Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua, el kiu evidentiĝas, ke Esperanto diferencas de la aliaj per tio, ke ĝi havas “spiriton” kaj “stilon”. En kio do precize konsistas tiu spirito kaj stilo? En la nevarieco de la elementoj de la lingvo, t.e. la neekzisto de fleksia kaj deriva sistemo. Ĉi tiu “koda” principo “ submetis la elekton de la vortoj al tri nepraj kondiĉoj, (1) ke ĉiu lingva elemento estu senŝanĝa kaj memstara; (2) ke ĉiu elemento estu nekonfuzebla kun iu ajn alia, forme aŭ sence; (3) ke ĉiu elemento povu kuniĝi, laŭbezono, kun ĉiu ajn alia. Tri kondiĉoj, kiuj profunde influis la konsiston de la lingvo Esperanto, kaj kies sekvojn eble ni ankoraŭ ne rimarkis ĉiujn” (p. 107). Je la malsupro de p. 117 la aŭtoro demandas, “sed kia estas la senco de *blanki*?” Laŭ mia opinio ĝia senco estas *impresi blanke*—certe ne *esti blanka*, ĉar *-i* ne = *esti*. Oni trovas similajn formojn en poezio kaj en prozo. Ekz. *Printempo alvenis, kaj verdas la kampoj*=la kampoj impresas, ke ili estas verdaj. *Subite tra la nebulo la monto grandis antaŭ ni*=la monto videbliĝis granda (en la Angla lingvo *loomed*). Ĉe tiaj adjektivoj oni cele *aldonas* la nuancon de ago (ili ordinare ne havas tiun nuancon), kaj tiamaniere, en tiuj specialaj nuancoj, fariĝas similspecaj kun adjektivoj kiel *prava, gaja, kapabla*, menciita en la artikolo (p. 120). Mi diru, ke mi plene konsentas kun la klarigo, kiun Waringhien donas pri la verbigo de tiaj adjektivoj. Antaŭ longe mi verkis artikolon por esprimi similan opinion, nome, ke oni rajtas verbigi adjektivon, nur kiam

troviĝas nuanco de ago. Mi supozas, ke por Waringhien, kiel por mi, tiaj formoj, kiaj *eblas, videblas* k.s. estas malbonaj.

(2) “La Frazo.” Estas pritraktitaj du apartaĵoj de nia lingvo: la objekta predikativo kaj la refleksivo. La pritrakto estas interesa, sed ŝajnas al mi, ke la teorio pri la “linieca strukturo” de malsimplaj *vortoj* ne estas egale valida ĉe *frazoj*. Plue, la teorio ŝajnas al mi nenecesa rilate la du apartaĵojn koncernatajn; alia kaj pli simpla klarigo estas ebla, krom ĉe la citita Juĝ. 11/23, kie normala apliko de la regulo pri la refleksivo postulus ŝanĝon de *Lia* en *Sia*.

p. 130–149, “**La Akuzativo en Interlingvistiko**,” represita el “*Esperantologio*” No. 1, 1949. Bonega artikolo, kiu montras (a) la kvar manierojn uzatajn en naciaj lingvoj por indiki la akuzativon; (b) la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la akuzativo; (c) ke Esperanto havas akuzativon, ĉar en multaj okazoj ĝi sola povas savi sencoklarecon, kaj tio estas aparte necesa por ne-eŭropanoj, kiuj ne konas en siaj lingvoj la *pozician* akuzativon. La historio de Esperanto montras, ke Zamenhof multe eksperimentis, antaŭ ol li definitive adoptis la akuzativon, kaj “n” kiel ĝian karakterizilon.

p. 150–164 pritraktas aparte la akuzativon en Esperanto. Post ampleksa kaj ĝisfunda studo de ĝi gravaj konkludoj rezultas, ekzemple, ke la akuzativo estas la ĉefa kaj esenca subtenilo de la tuta Esperanta sintakso, kaj eble ĝia plej karakteriza trajto. En nenia alia lingvo (krom la Franca de la 11a kaj 12a jarcentoj) ĝi ludas analogan kaj egale gravan rolon.

**Parto II. “Niaj Problemoj.”** (1) “La Landnoma Demando” p. 175–188. La aŭtoro provas esti senpartia, sed li ne tute sukcesas. Estas psikologia

veraĵo, ke ofte oni forgesas pri devo, se tiu devo estas neplaĉa. Eble tio okazis ĉi tie. Sur p. 179/21 sek. Waringhien nomas malveraĵo la dirajon de Cart, ke jam en la jaro 1909 la Akademio oficiale voĉdonis kontraŭ la sufikso *-io* por landnomoj, kaj li aldonas inter krampoj "ni vidis, ke oficiala voĉdono pri *-io* ne okazis, eĉ en la Akademio." Nu, tio, kion "ni vidis", estas la interpreto, kiun Waringhien donas pri la tiutempa raportoj de Boirac al la Sesa Kongreso. Ŝajnas, ke sekve de parta elekto de vortoj el la *Oficiala Gazeto*, 25 Aprilo 1910, p. 322, Waringhien mem prezentas al ni malveraĵon, ĉar paĝo 326 de tiu *Oficiala Gazeto* indikas, ke la Akademio ja voĉdonis tiam kontraŭ *-io*, kaj ke nur unu voĉo ĝin aprobis.

Alia malveraĵo sur tiu paĝo 179 estas la aserto, "Kontraŭ tiu iniciato Cart, Corret kaj Butler komencas vastan agitadon precipe, laŭ la metodo de Cart, per incita privata korespondado." Jen ekzemplo de persista trajto de Waringhien, nome, ataki, eĉ malĝentile ataki, homojn, kies opinioj estas kontraŭaj al liaj propraj, precipe se tiuj homoj estas (laŭ lia moknomo) "religiaj mistikuloj". M. C. Butler certigis al mi, ke la aserto de Waringhien estas malveraĵo. La menciitaj homoj ne komencis ion tian. Butler propraelspeze eldonis traktaĵon "Fideleco", por protesti kontraŭ la uzado de *-io* en la gazeto "Esperanto", la oficiala organo de U.E.A. Ankaŭ protestis la Universala Kongreso, la Akademio, la Lingva Komitato, la Brita Esperantista Asocio, kaj multaj naciaj Asocioj, ankaŭ la tutmonda gazetaro, kun escepto de la S.A.T.-aj kaj la maldekstrumaj politikaj gazetoj. (Parenteze, M. C. Butler eldonis valoran fidindan broŝureton "Pri Landnomoj". Ĝi estas ankoraŭ havebla, kaj meritas zorgan tralegon,

precipe flanke de tiuj, kiuj sentas tenton cedi al la subtile prezentataj argumentoj de subtenantoj de *-io*.)

Nu, la artikolo havas makulojn, tamen ĝi estas valora kontribuo al la studo de perpleksa problemo, kaj mi tute konsentas pri la unua konkludo de la aŭtoro, ke ne estas eble trovi unu regulon por la formado de ĉiuj landnomoj.

En *The British Esperantist*, March 1960, p. 215, troviĝas grava noto verkita de D. B. Gregor, kiu atentigas, ke *-ujo* fariĝis ne nur sinonima kun *lando*, sed ankaŭ kapabla indiki iun terenon kun fiksitaj limoj, kiel *prefektujo*, tiel pruvante sian vivantecon kaj vivipovecon. Agacas lin, kiel min, "monstroj" kiaj *patrio*, *prefektio*—ankaŭ kiaj *Anglio*, *Grekio*, *Romio*, *Izraelio* k.s. Waringhien ofte uzas tiajn formojn.

(2) "La Esperanta Pasivo" p. 189–205. Ĝisfunda studo de la problemo, kiu verdire devus neniam esti starigita, ĉar ĝi estiĝis nur sekve de erara supozo, ke la aktiva kaj pasiva konjugacioj estas nete paralelaj. Waringhien pravas, ke ili ne estas, kaj ke la paraleleco estas inter la simpla formo de la aktiva voĉo kaj la responde kunmetita pasiva formo. Li montras ankaŭ, ke Zamenhof ofte uzis la formon *estis -ita* por esprimi la simplan pasintecon, la preteriton—eĉ en la Fundamenta Ekzercaro (§39:11).

"Tri Enketoj" p. 206 sek. (1) "Pri la Modo post malhelpi, malebligi, estas eble." Tikla problemo, ĉar tiuj vortoj esprimas ne nur volon, sed ankaŭ aliajn nuancojn. La artikolo klarigas la motiven, kiuj subkuŝas la prezentadon en *Plena Gramatiko*. (2) "La Modo post kvazaŭ." Problemo prezentas sin nur kiam *kvazaŭ* funkcias kiel subjunkcio. Zamenhof uzis post ĝi kaj indikativon kaj kondicionalon,

probable ĉar li volis konservi la fluidecon de la Rusa partikulo *budto*. Jen, diras Waringhien, kial *kvazaŭ* havas la neŭtralan plurvizaĝan finaĵon *-aŭ*. Nu, tia fluideco estas ĝena al neslavlingvanoj, kaj oni bezonas gvidan principon. Bailey kaj Butler provis provizi tian, kaj per tio vokas sur sin la kondamnon de Waringhien. Mi partoprenu en la kondamniĝo! Mi opinias, ke Butler provis simplan kaj pravan principon, kaj mi tute ne konsentas la principon provizitan de Waringhien, ke oni devas ĉiam uzi la kondicionalon post *kvazaŭ* kun la nuanco *kiel se*. Ĉio dependas de la nuanco dezirata. (3) "Pri la sufikso *-end-*" p. 222-224. Waringhien provas montri, ke ĉi tiu sufikso estas superflua. Sed la artikolo estas malaktuala, ĉar la sufikso jam estas oficialigita (vidu la piednoton sur p. 224), kaj la aŭtoro mem uzas ĝin.

**"Kelkaj Gramatikaj Konsultoj"** p. 225-238. Demandoj kaj respondoj pri uzado de diversaj esprimoj, ekzemple, *dum kiam, ĝis kiam, des pli, antaŭ ol kaj post kiam*, ktp. La lasta demando temas pri uzo de aktiva infinitivo kun pasiva senco post *lasi* kun refleksivo. Kvankam tia uzo estas idiotismo en nur du-tri naciaj lingvoj, Waringhien volas reteni ĝin en Esperanto, argumentante, ke ĝi kreas nenian konfuzon (tamen ĝi kreas povus, se la kunteksto ne klare komprenigus la sencon bezonatan), kaj ke la aktiva infinitivo ofte havas neŭtralan sencon, kiun oni komprenas aktive aŭ pasive laŭbezone. La argumento ne konvinkas min. La fakto, ke idiotismoj troviĝas en naciaj lingvoj tute ne pravigas la uzon de ili en Esperanto; mi do restas ĉe la opinio, ke ĉi tiu idiotismo devus ne havi lokon en nia lingvo—des pli pro tio, ke tre ofte la uzo de la Medialeja Infinitivo estus tute logika kaj ĝusta. Ekzemple ĉe 96/3 aperas *kelkaj*

*esperantistoj ne lasis sin konvinki per ili*. La uzo de *konvinkiĝi* tie estus tute prava, kaj ĝi evitus la nenecesan idiotismon.

**"Neologismoj"** p. 244-256. (1) "Kial riĉiĝas la vortaroj?" Ĉar novaj teknikoj postulas novajn vortojn. Ni bezonas novajn vortojn ankaŭ por distingi inter diversaj aspektoj de kutimaj objektoj, ankaŭ por esprimi hejmajn, metiistajn kaj profesiajn aferojn. Tamen, la pravigo de kelkaj menciitaj neologismoj (p. 247-249) ŝajnas al mi dubinda. Ekzemple, Waringhien diras, "*rapidi (esti rapida ne samsignifas kiel hasti)*." Sed *rapidi ne=esti rapida* (Waringhien mem montris antaŭe (p. 120), ke *-i ne=esti*, sed *iri rapide*, kaj tio estas samsignifa kiel *hasti*; *hasti* do estas nenecesa. La rezonado pri aliaj vortoj ŝajnas al mi simile lama.

**"Editoraj Demandoj"** p. 257 sek La komencaj paragrafoj provas pravigi la uzon de la neologismo "Editoraj", montrante, ke ĝi ne signifas "Eldonistaj". Sed nenie estas mencio de la vorto "redaktoraj" aŭ "redaktistaj", supozeble pro tio, Waringhien limigas la sencon de tiuj vortoj al homo, kiu okupas sin nur pri pretigado de artikoloj por gazeto. Sed oni uzas tiujn vortojn kun multe pli ĝenerala senco ol tio, kaj la neologismo estas nenecesa.

En ĉi tiu parto de sia libro Waringhien indulgas sin per maldolĉa kritikado de "editoroj", kies laboro ne plaĉas al li—kaj aparte de Wm. Bailey kaj mi. Li diras, ke ni estas homoj, "kies spirito ne ŝatas flekseblecon kaj malrigidecon en la lingvaj aferoj." Tial (laŭ li) ni en la notoj de la 17a eldono de la F.K. "konstante korektas *konstruo* per *konstruaĵo*, *kompetento* per *kompetenteco*, *elpenso* per *elpensaĵo*, *bezona* per *bezonata* ktp." Nu, ni sugestis tiajn korektaĵojn, ĉar ni ŝatis precizecon—tiun kvaliton, pri kiu Esperantistoj

ofte fiere pretendas, ke ĝi estas unu el la ĉefaj indaj trajtoj de nia lingvo. Plue ni memoris, ke F.K. sin prezentas kiel modelon de lingvo-uzado, kaj en tia modelo ĉiuj indaj trajtoj devus esti senmanke ekzempligitaj.

En la IIIa parto de ĉi tiu sekcio Waringhien skribas aparte pri "La Nova Eldono de la *Fundamenta Krestomatio*". Li diras, "La editorado de tia verko, por esti kompleta, devus prezenti duoblan karakteron, historian kaj lingvan. Nu, oni povas diri, ke la historia dokumentado preskaŭ tute mankas." Jes, ĉar oni komisiis al la redaktontoj nur la lingvan taskon, nome, indiki per piednotoj, kie necese, la esprimformon, kiun uzus kompetenta moderna Esperantisto, kiu respektas la Zamenhofan lingvo-uzadon. Oni ankaŭ avizis la redaktontojn, ke la disponebla spaco por la piednotoj estas severe limigita. Do estis neeble prezenti historian dokumentadon.

La Va parto de ĉi tiu sekcio estas "La Biblia Malnova Testamento". Ĝi konsistas preskaŭ entute el severa kritikado (1) de ses "korektaĵoj", kiujn mi faris en la 1954a eldono de la Biblio, (2) de "deklaro" (tiel Waringhien — tamen vere opinio), kiun mi esprimis en letero al *The British Esperantist*, June 1957, kaj kiun Waringhien opinias eksterordinare danĝera. Nu, mi konsentas la principon, "Se vi prezentas al la publiko la Malnovan Testamenton 'el la hebrea originalo tradukitan de L. L. Zamenhof', vi ne rajtas liveri sub lia nomo fremdajn al li dirmanierojn." Pri la lokoj, kie mi vere pekis kontraŭ principo, mi petas pardonon. Tamen, mi dubas, ĉu mi efektive pekis rilate al ĉiuj ekzemploj cititaj de Waringhien. La dirmanieroj de Zamenhof ne estis absolutaj, nepre samaj en ĉiuj okazoj; kaj mi opinias, ke se mi havus sufiĉe da tempo, mi

povus trovi en liaj dirmanieroj paralelojn al la plejmultaj el, se ne al ĉiuj, miaj "korektaĵoj". Rilate tiujn korektaĵojn Waringhien citas kontraŭ mi, *Evare humanum est, perseverare diabolicum*. Responde mi citas la eksplikon, kiun Waringhien mem donas sur p. 428 de tiu Latinaĵo, "bela mezepoka maksimumo, kiu, kiel dutranĉa glavo, absolvis la stultulon kaj bruldannis la konscienculon."

Parenteze: Ŝajnas al mi, ke estas bezonataj *du* eldonoj de la Malnova Testamento. Unu, kiu konservas precize la Zamenhofan tradukon por tiuj, kiuj volas rigardi la M.T. kiel trezorejon de Zamenhofaĵoj; kaj *dua*, kiu prezentas funde reviziitan tradukon, por tiuj, kiuj volas rigardi la M.T. unualoke kiel religian trezoron, kaj nur dualoke kiel stil-libron de Esperanto. Mi komencis labori super tia traduko, kaj mi intencas kunlabori kun aliaj Esperantistoj, kiuj havas kompetentecon pri la Hebrea lingvo kaj pri la religiaj valoroj, kiuj konsistigas la ekzistmotivon por la libro. En mia malneto mi intencas indiki la formojn, kiuj troviĝas en la originala manuskripto de Zamenhof, kaj mi esperas, ke la redaktoro de "Dia Regno" konsentos presigi de tempo al tempo mian malneton, por ke mi ricevu komentojn kaj sugestojn pri ĝi, kaj por ke interesitaj Esperantistoj povu havi la originalajn Zamenhofajn formojn.

La VIa parto de ĉi tiu sekcio havas la titolon "La Nova Testamento". Ĝi enhavas interesajn kaj valorajn notojn pri dezirinda glatigado de la lingvaĵo kaj pri plibonigo de la traduko. Tamen ne ĉiuj estas akcepteblaj.

(daŭrigota)\*

\*Ĉi monate la legantoj ne sentos la mankon de "Lingva Angulo".

\***Tempesto super Akonkagvo** de Tibor Sekelj. El la hispana tradukis Hugo E. Garrote. Eldonita de Serbia Esperanto-Ligo, Terazije 42, Beograd, Jugoslavio. 232 p. Prezo bindita 15ŝ., afr. 1\$ 0p.; broŝurita 12ŝ. 6p., afr. 9p.

Mi tre volonte legas pri aventuroj en malproksimaj landoj; kaj estas eĉ pli granda plezuro legi en Esperanto pri montregionoj kaj esplorgrimpado.

La libro *Tempesto super Akonkagvo* estis verkita en 1944 en hispana lingvo de nia esploristo Tibor Sekelj kaj jam aperis en kvin eldonoj. La Esperantan tradukon eldonis la Serbia Esperanto-Ligo honore al la Zamenhofa Jaro.

Kun emocio mi legis en la antaŭparolo kiel la aŭtoro hisis la verdstelan flagon ĉe la supro de Akonkagvo, kaj mi sekvis liajn postajn rakontojn kun granda intereso. La tragedio, kiu trafis la kamaradojn dum la unua ekspedicio, kaj la reira grimpadado de nia Tibor Sekelj post unu jaro por certigi pri ilia sorto, faras rakonton kiu devigas al senĉesa legado ĝis la fino.

Tre modeste en la lasta paĝo li mencias la oran kondoron aljuĝitan al li, sed li ne klarigas ke aljuĝo al civilulo estas unika.

La preslitteroj estas facile legeblaj, sed la fotografaĵoj povus esti pli klaraj. Tamen la vortbildoj pli ol kompensas; ekzemple, la priskribo de kaverno sur paĝo 55 kaj tiu de la glaciaj fungoj sur paĝo 56.

Se ankaŭ vi emas legi pri ekscitaj esploroj, mi forte rekomendas ĉi tiun libron.

*Nora Holmes.*

**Vegetarano**, organo de Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio, aperas kvarfoje en la jaro, provizore multobligita. Krom la vegetarismo la enhavo temas ankaŭ pri la etiko, higieno kaj ekonomio. Abonebla pere de B.E.A. Jarabono 3ŝ.

**Selinuntaj Varmobanejoj Sciacca.** Prospekto kun aldona Esperanta teksto pri kuracloko en Scilio. Havebla ĉe Selinuntaj Varmobanejoj de Sciacca, Sicilio, Italujo.

**Ekskurso en nombroj** de F. Emerson Andrews. Tradukita el la angla kaj eldonita de la Duodecimals Societo de Ameriko, 20, Carlton Place, Staten Island 4, New York, Usono. Mendebla senpage ĉe la D.S.A. aŭ ĉe la Duodecimals Societo de Granda Britujo, 106, Leigham Court Drive, Leigh-on-Sea, Essex. 10 p. Broŝ.

Ĉi tiu broŝuro estas efektive mallonga sed informplena kurso pri nombrado. Ĝi komencas per historio de la fingra nombrado ĉe primitivaj triboj ĝis la hodiaŭa sistemo nomita araba. La multaj ĉiutagaj uzoj de unuoj de pakado, distanco, tempo, gradoj, k.t.p. montris, ke ni nature elektas dozenajn grupojn. En ĝi troviĝas klara skizo de la kalkulado laŭ la bazo dek du, sekvata de pruvo, kaj teoria kaj praktika kun ekzemploj, de ĝiaj superecoj. Fine la ebleco de ĝenerala alprenado de la tiel efektiva duodecimals sistemo estas diskutita nekaŝeme kaj favoreme.

Speciale decas, ke tia temo estu pritraktita en Esperanto. La homanaro devas havi ne nur unu lingvon, sed unuigitajn normojn por pesoj kaj mezuroj, k.t.p. Tiel, kiel ĝi meritas la plej taŭgajn lingvosistemon, ĝi bezonas la plej taŭgan kalkulado-sistemon.

*B. R. Bishop.*

\***Koncerta Kantaro, unua parto.** Tekstoj tradukitaj de Jan Ziermans. Eldonita de P. C. Brederode kaj K. Veldkamp. Prezo: 6ŝ. 6p., afr. 9p.

Ĉi tiu libro konsistas el simplaj kantoj kun facila akompano kaj enhavas interalie kompanaĵojn de Schubert, Mendelssohn, Schumann, Beethoven, Haydn kaj Mozart. La muziko estas klare presita.

**Kastelo Münchenweiler**, Geonista Bulteno N-ro 6, skize informas pri la celo de la Geonismo (studi ĉiujn kulturdemandojn, kiuj koncernas la Teron en ĝia tuteco) kaj pri ĝia centro en la bela kastelo. Tie okazos ĝia kunveno de 7-21 aŭgusto, kun tre interesa programo enhavanta du prelegojn de S-ro D-ro Juan Régulo Pérez: "La disvolvigo de la eldonejo "Stafeto," kaj "Mia naskiĝ-lando, la Kanariaj Insuloj". Detaloj de: Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern, Switzerland.



## ESPERANTO EN RADIO

### La Voĉo de Ameriko

(2300–2330 B.S.T. sur 31.19 m.)

**24 Junio:** Literatura programo: La Usona Romano kaj Ĝia Tradicio. Intervjuoj kun D-ro Stephen Zamenhof (pri la Zamenhof-familio), S-ino Connie Davis (pri la instruado de Esperanto en lernejoj por plenkreskuloj) kaj S-ro C. Stanley Otto (pri Skoltoj kaj Esperanto). Respondoj al demandoj pri Esperanto en Usono.

**1 Julio:** Diskutrodo pri la Usona Ekonomia Sistemo: Reed Irvine, de la Federacia Rezerv-Banka Sistemo; Gadsden Shand, de la Esplora Fako de la Registara Oficejo pri Malgrandaj Entreprenoj; Thomas A. Goldman, de la Kompanio por Ekonomia kaj Industria Esploro; D-ro William Solzbacher, de la Voĉo de Ameriko. Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko: S-ro Mark Starr respondos al du demandoj pri la manko de grava socialdemokrata partio en Usono. Aliaj demandoj estas: “Kial kelkaj personoj timas, ke katoliko povus fariĝi Prezidanto de Usono?”, “Kiel loĝas laboristoj en Usono?” kaj “Kiel usonaj laboristoj pasigas sian libertempon?”

**8 Julio:** Programo pri Edukado kaj Lernejoj en Usono. Intervjuoj kun S-ino Consuelo de Sánchez Latour kaj S-ro Héctor Sánchez Latour el Gvatemalo kaj kun S-ro Eizo Ito el Japanujo. Demandoj ricevitaj el Polujo, Hungarujo, Koreo kaj Madagaskaro pri sciencaj esploroj, virinaj rajtoj, kaj politikaj partioj en Usono estos respondataj, se la tempo sufiĉas.

Raportoj pri ricevkondiĉoj kaj opiniesprimoj pri la enhavo estu adresataj al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D.C., Usono.

## Radio Varsovio

Oni timis, ke post la 44a Universala Kongreso la pola Radio maldaŭrigos siajn esperantlingvajn elsendojn. Tute ne! Ankoraŭ nun po duonhora **ĉiutage** oni povas aŭdi Esperanton per tiu bone funkcia elsendilo. Neniu plu rajtas nomi sin malgraŭvola izolulo aŭ eble ruĝiĝi pro malbona akcento. Aŭskultu regule, akiru vere internacian prononcon, kaj tiam skribe danku viajn plibonigintojn!

Programo de 15 aprilo ĝis 15 Oktobro 1960 (sur ondlongoj 25.09, 25.16, 25.42, 31.01, 31.45, 31.50, 42.11, kaj 249 metroj): *Lunde:* felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, priesperanta temo. *Marde:* muziko (ĉiun duan mardon: anguleto por blinduloj). *Merkrede:* kultura kroniko kaj koncerto kun bondeziroj. *Ĵaŭde:* Komentario pri aktualaj temoj, kaj leterketo. *Vendrede:* literatura rubriko. *Sabate:* sonrevuo pri la semajno en Polujo. *Dimanĉe:* Panoramo de internaciaj eventoj; novaĵoj el Esperantujo; rubriketo por infanoj.

## Mortoj

La 4-an de Aprilo mortis 75-jara veterano de la Esperanto-movado—**Percy J. Cameron**. Li esperantistiĝis ĉirkaŭ la jaro 1903 kaj baldaŭ fariĝis tre vigla kaj fervora samideano. Li helpis fondi klubon en Battersea, aliĝis al B.E.A., la Londona Klubo, kaj, post kelkaj jaroj, transloĝiginte en Letchworth, fariĝis membro de la tiea Societo. En la fruaj jaroj li instruis Esperanton kaj ofte vizitis aliajn klubojn, multfoje partoprenante kunvenojn kaj ekskursojn de la Emmanuel Klubo en Camberwell, 1907–14. Li verkis multajn artikolojn sub la pseudonimo “Noremac” kaj lastatempe uzis sonbendojn. Kiel memorajo, la Societo en Letchworth intencas partopreni la Operacion “Adoptaj Patroj”, sendante al la L.K.K. de la Kongreso 400 belg.fr. (E.A.A.)

La 30an de Aprilo mortis 74-jara S-ro **W. W. Gardener**, membro de la Sidcupa Societo kaj, ek de 1940, ankaŭ de B.E.A.

## THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION Inc.

### OFFICIAL NOTICES

**President :** Mrs. F. W. White, F.B.E.A.

**Hon. Secretary :** W. A. Gething, O.B.E., B.Sc.

**Hon. Treasurer :** J. C. Rapley

**Hon. Education Secretary :** M. C. Butler, M.R.S.T.

**Secretary :** J. W. Leslie, F.B.E.A.

**Registered Office :** 140, Holland Park Avenue, London, W.11. Tel.: PARK 7821

**Hours :** Weekdays 9 a.m. to 5 p.m. (closed 1-2 p.m.); Saturdays 9 a.m. to 12 noon

#### NEW JUNIOR MEMBERS

Edwards, T. A.	<i>Belfast, 15</i>
Jones, A. J.	<i>High Wycombe</i>
Lindlay, T.	<i>Wallasey</i>
Montgomery, K. M.	<i>Belfast, 4</i>
Mosley, Miss G. H. J.	<i>Sheffield, 6</i>
Smith, D. J.	<i>Welwyn</i>

#### NEW MEMBERS

Boyd, A.	<i>Newcastle-upon-Tyne, 4</i>
Dakers, Miss A. P.	<i>Edinburgh, 12</i>
Faithfull, R. G.	<i>Liverpool, 3</i>
Lahmers, H.	<i>Douglas, I. of M.</i>
Maby, M. A.	<i>Nowra, N.S.W.</i>
Woosnam, W.	<i>Bristol, 4</i>

#### DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged: £88 13s. 3d.

Under 2s.: 1s.

3s.: N. Hurt, J. McKain.

4s. 6d.: F. Ashpole.

5s.: R. Bassett, H. Clarke, W. W. Harrison,  
L. H. May, F. A. Scarborough.

9s.: Eastern Esperanto Federation.

15s.: J. K. W. Norbury.

22s. 6d.: D. B. Greene.

£3: Halifax Esperanto Society.

£4 4s.: Romford Esperanto Society "In  
Memory of K. R. C. Sturmer".

£8: "Anonymous".

Total to 20th May, 1960: £108 0s. 3d.

#### DONATIONS TO "B.E." SUPPORT FUND

Previously acknowledged: £11 6s. 6d.

5s.: W. W. Harrison.

7s. 6d.: F. Gateshill.

10s.: Miss G. Scott-Kellie.

Total to 20th May, 1960: £12 9s.

#### DONATIONS TO ADVERTISING FUND

Previously acknowledged: £24 4s. 3d.

4s. 4d.: E. Colins.

20s.: Mrs. E. Nicholson "In memory of  
K. R. C. Sturmer".

Total to 20th May, 1960: £25 8s. 7d.

#### B.E.A. EXAMINATION RESULTS

##### Advanced Examination

By Correspondence

Roberts, Christie W.	<i>Rose Valley, Sas.</i>
*Diaz, Amador	<i>Southampton</i>

##### Advanced Examination

Oral Part

Berry, Miss	
Colleen M.	<i>Auckland</i>
Jackson, Miss	
Margaret M.	<i>Stonehouse</i>
†Graham, James	<i>Helensburgh</i>

##### Examination for Schools

*Cochrane, R.	<i>Royal Normal College for the Blind</i>
*Filkins, S.	" " "
Southern, V.	" " "
Tooke, R.	" " "
Ancill, R.	<i>Egerton Park County Secondary School</i>
*Binyon, R.	" " "
Carr, J.	" " "
Evans, C.	" " "
Gilligan, R.	" " "
Glover, S.	" " "
Hulme, A.	" " "
*Jackson, B.	" " "
*Kennerley, P.	" " "
Lord, C.	" " "
Mulcahy, P.	" " "
*Nixon, R.	" " "
Tomkinson, J.	" " "

\* Denotes a candidate who has passed with Distinction.

† Denotes a candidate who, having passed both the Written and the Oral Part of the Advanced Examination, has been awarded the Advanced Diploma.

**Solvo de la Silabenigmo en "B.E."**  
de Majo : lia, arbo, lilio, ario, nano,  
didelfo, okulo, dalio, ebono, lojala  
("La lando de la blinduloj").

A. D. Cook.

# SMALL ANNOUNCEMENTS

2d. per word. Minimum 2s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

**Gardu do bone** viajn animojn, por ami la Eternulon, vian Dion. *Josuo* 23. 11.

**Brita Esperanto-Humanistaro.** Bonvenigas ĉiujn Humanistojn en sian membranon. Filiĝinta al B.E.A. Sendu minimume 7s. 6p. kiel kotizon al Sek.-Kasisto, G. L. Dickinson, 21, Gribble Road, Liverpool, 10.

**The Workers' Esperanto Movement** associates world friendship with trade union, co-operative and socialist principles. Details and magazine sent free: 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

**Socialist Leader,** 48, Dundas Street, Glasgow, C.1. Single copies 3d. : 12 weeks 4s. : 24 weeks 8s. : 52 weeks 15s. 6d. Complete *Esperanto* article in every issue.

**Plena Vortaro,** large format, wanted; details to: Campbell, 94, Mastrick Drive, Aberdeen.

**Itala Junulino,** por pliperfektigi en angla lingvo, deziras pasigi proksimume unu jaron en Anglujo, restante "au pair" ĉe Londona familio. Ŝi estas preta vojaĝi komence de Septembro. Respondoj al: F-ino Sandrini, via Tolmino 15, Sesto S.G., Italujo.

**La Interrilata Centro Internacia de la Esperantistaj Kampadistoj (ICIEK)** invitas britajn Esperantistajn kampadistojn sub-

teni ĝin per aliĝo. Jarkotizo estas 3 ŝilingoj (inkluzivas abonon al la Bulteno). Pagu al B.E.A. ICIEK bezonas britan reprezentanton. Kiu proponos sin? Sendu poŝtmarkon por ricevi specimenan ekzempleron de la Bulteno al B.E.A.

**Deziras korespondi** pri filatelio kaj interŝanĝi kun seriozaj kolektantoj poŝtmarkojn V. Trofimov, str. Frunze 17 loĝ. 1, Kiev 71, U.S.S.R.

**Lernejaj instruistoj** estas kunvokataj partopreni la internacian lernantan gazeton "Grajnoj en Vento", rondcentro Polski Trambeš, Tirnovsko, Bulgarujo. Pluajn informojn donas: Hristo Manolov, gimnazia direktoro, ĉe tiu adreso.

**Nova Kurso**—okazas ĉe 4 Shaa Road, Acton, London (komenciĝis je 6 Majo) ĉiuvendrede. Organizita de *International Friendship League*. Ankaŭ ne-membroj de IFL estas bonvenaj. Petu informojn de la Sekretario, "Peace Haven", Creswick Road, Acton, London, W.3.

**Sekretarioj de Grupoj/Federacioj.** Bonvolu, kaj nepre, informu la Sekretarion de B.E.A., per aparta oficiala letero, pri ŝanĝoj de la oficantoj de via Grupo/Federacio. Dankon antaŭan.

## PLEASE HAND THIS TO A FRIEND WHO IS NOT YET A MEMBER

**THE British Esperanto Association** consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION: 20s. per annum. Persons joining after 1st July may pay 10s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),  
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I, .....

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first Subscription of .....

Signature .....

Nationality ..... Rank, Profession or Occupation .....

Address .....

Date ..... Age (if under 21) .....

# DON'T FORGET YOUR ESPERANTO

by neglect during the summer months. Excellent light reading is found in the "Epoko" books. Clear print and card backs: really good value at the following low prices

Nos. 3 - 6, 2/- each: Nos. 7 - 11, 4/- each  
post 5d. each extra

1. Tute elvendita.
2. Tute elvendita.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse. El la Angla G. Badash. 188 paĝoj—La konata Angla humoristo rakontas. . . .
4. **La Tempo-Maŝino: Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells. El la Angla E. W. Amos. 188 paĝoj—Spertoj pere de la tempa fervojo.
5. **Princino de Marso.** E. Rice Burroughs. El la Angla K. R. C. Sturmer. 190 paĝoj—Aventuroj sur alia planedo.
6. **Colomba.** Prosper Merimée. El la Franca J. Beau. 188 paĝoj—Pri Korsikaj interfamiliaj kvereloj.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi. El la Hungara L. Spierer. 156 paĝoj—Kiel maldungito venĝis sin.
8. Tute elvendita.
9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig. El la Germana K. R. kaj P. E. Schwerin. 160 paĝoj—Psikologiaj kaj aliaj interesaj rakontoj.
10. **Kiso de la Reĝino.** I. F. Najivin. El la Rusa D. Staritsky. 188 paĝoj—Aventuroj en la Belga Kongo.
11. **La Karnavalo kaj la Somnambulino.** K. L. Immermann. El la Germana A. E. Wohlthat. 104 paĝoj—Romantika aventuro malnovstila.

*Published by*

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD., ENGLAND**

*Order from*

**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.,  
140, Holland Park Avenue, London, W.11**